

La Evangelio Kopta laŭ Tomaso

El nederlanda, latina, germana kaj angla tradukoj
tradukita de Gerrit Isai Berveling 1981

Unua publikigo:

Biblia Revuo – XVII jaro – tria serio – januaro-marto 1981, paĝoj 3-19

Broŝure:

La Evangelio kopta laŭ Tomaso

El nederlanda, latina, germana kaj angla tradukoj trad. Gerrit Berveling
dua korektita eldono

Voĉoj Kristanaj 22

VoKo, Breda 1994

Interrete:

Klarigo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Evangelio_laŭ_Tomaso

Fotoj (nigraj-blankaj) de la Kopta originalo el Nag Hamadi:

http://gospel-thomas.net/x_facets.htm

La esperanta traduko de Armando Zecchin:

http://www.ueci.it/eldonoj/verkoj/tomaso_evangelio.htm

Germanaj tradukoj:

Berliner Arbeitskreis für Koptisch-Gnostische Schriften:

<https://www.heiligenlexikon.de/Literatur/Thomas-Evangelium.html>

Judas Phatre, Freiburg:

<https://www.diegutebotschaft.de/thomasevangelium/>

Anglaj tradukoj, ekzemple:

Stephen Patterson and Marvin Meyer:

https://reluctant-messenger.com/gospel-thomas-Stephen_Patterson.htm

Thomas O. Lambdin:

[https://www.marquette.edu/maqom/Gospel of Thomas Lambdin.pdf](https://www.marquette.edu/maqom/Gospel_of_Thomas_Lambdin.pdf)

Wim van den Dungen:

<http://www.sofiatopia.org/equiaeon/thomas.htm>

Nederlanda traduko:

Jos Stollman:

<http://www.thomasevangelie.nl/tekst0.htm>

Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-11.

Enkonduke

*al la Evangelio Kopta laŭ Tomaso*¹

La trovaĵo ĉe Nag Hamadi

Pli malpli dekkvin kilometrojn norde de la nuna Luksoro, la iama ĉefurbo Tebo, Nilo akre turniĝas okcidenten. Tie sur la bordo maldekstra staras la granda templo de la bovin-diino Hator. Ankoraŭ kvindek kilometrojn plue la rivero ree norden fluas. Tieaj restaĵoj de du, nun forlasitaj, monaĥejoj kaj ankaŭ la ĉeesto de por Egiptujo relative granda nombro da kristanoj memorigas pasinton gravan por la eklezia historio.

Ĉar tie, ĉ. 320 p. Kr., Paĥomio konvertiĝis al kristanismo. Paĥomio kolektis ĉirkaŭ si aliajn ermitojn, kio estis la ekiĝo de monaĥeja vivado, kiu de tie disvastiĝis ĝis tute norde de la lando: Aleksandrio. Je lia morto jam estis pli ol kvinmil monaĥoj!

Tiu loko, do, tiutempe Ĥenoboskiono laŭnome, estas la lulilo de monaĥismo. De Egiptujo ĝis diskoniĝis ĝis Irlando kaj de tie tra tuta Eŭropo.

¹ Oni bone atentu, ke tiu ĉi Evangelio Kopta laŭ Tomaso nepre ne identas kun la same apokrifa Evangelio de Pseŭdo-Tomaso, kies Greka teksto portas la titolon: Diroj de Tomaso, Israela filozofa, pri la infanaĝo de l' Sinjoro.

Maldekstraborde tie troviĝas nuntempe Nag Hamadi, urbo laŭ kiu ricevis sian nomon papirusoj, kiujn en 1945 aŭ 1946 trovis terlaboristoj lokaj en granda argila potoj. Estis entute dek tri kodeksoj! Lade binditaj kaj sufiĉe bone konservitaj. La felahoj, nekonante la valoron de sia trovaĵo, ĝin je ege malalta prezo vendis. Jam en 1946 unu el la kodeksoj translokiĝis al la Kopta² muzeo de Kairo. Pere de kromvojaĝo tra Franca arkeologia instituto, la plimulto de l' ceteraj kodeksoj fine ankaŭ trovis tiun saman muzeon. Sed unu kodekso, nun konata kiel kodekso-Jung, estis post treege penigaj intertraktadoj akirita de la Jung-instituto en Zuriko.

La tuto origine plej verŝajne apartenis al biblioteko de lokaj monaĥoj.

La aĝo de la trovitaj verkoj ne estas facile determinebla. Provizore oni supozas, ke la manuskriptoj datiĝas el la kvara jarcento, sed ĉar temas pri kopioj, nenio direblas pri la datoj de la originaloj. Ofte konstateble ili estas tradukoj el la Greka, kion oni vidas i. a. el stilaj malglataĵoj kiuj kvazaŭ spegulas la Grekan sintakson.

La dek tri kodeksoj entenas kune pli malpli 50 verkojn.

La lingvaĵo estas la Kopta, lasta formo de l' malnova Egipta lingvo. Simplige oni povas diri, ke Kopta estas Egipta, skribita per Grekaj literoj. Kaj fakte, post konkero fare de la Islamo, tiu lingvo estis preskaŭ tute forpuŝita de ilia lingvo, la Araba. La Kopta, por tiel diri, ŝtoniĝis kiel religia, literatura lingvo.

Diroj de Jesuo

Unu el la verkoj de Nag Hamadi, el kodekso dua, estas *la Evangelio Kopta laŭ Tomaso*.

² KOPTA devenas el la Araba QUBT, kiu siavice devenas el la Greka AIGYPTIO, kiu estas adaptiĝo de l' malnova Egipta KEMET = nigra (grundoj).

Tio ĉi estas apokrifa kolekto de *Logia* aŭ *Diroj de Jesuo*. Kelkaj el ĉi kolektoj jam estis konataj en la Greka.

Kiam post Pentekosto la apostoloj disiris por prediki pri Kristo Reviva, kompreneble ili kunportis kun si memorojn neforviŝeblajn pri sia Majstro, sed tre baldaŭ lernintoj de l' disĉiploj ankaŭ ekpredikis pri la Mesio *veninta*, kies vivon kaj dirojn ili devis sciigi al ĉiuj popoloj, do estiĝis bezono pri kolekto da *Diroj de Jesuo*. Tiujn uzante ili plej ekzakte povus vortojn liajn citi kaj klarigi al siaj aŭskultantoj.

Ke tiaj kolektoj vere ekzistis, dedukteblas ekzemple el komparado inter la diversaj evangelioj. Plurloke ili citas tute aŭ preskaŭ tute la samajn vortojn de Jesuo, sed en malsama kunteksto. Komparu ekz. la «Montopredikon» de Jesuo ĉe Mateo kun ties paratekstoj. Ĉe Luko Jesuo ĵus descendis de monto, kiam li ekdiras siajn famajn «Feliĉodirojn». Ĉe Mateo li unue supreniras monton!

Sed la *Diroj* mem estas ege ofte tre samaj, eĉ laŭlitere!

Do, supozeble, la evangeliistoj ne ekzakte sciis detalojn pri la okazaĵoj de l' jesua vivo, dum liajn *Dirojn* ili jam trovis en skriba formo ekzistantaj.

Eĉ kaj por ni nuntempuloj tre mirige, eĉ pri tiom decidaj okazaĵoj kiel liaj proceso kaj morto, la ekzakta sinsekvo historia ne estas senkontraŭdire deduktebla el la evangelio.³ Sed tiuj ja ne estas historiaj monografioj!

Laŭ la unuaj kristanoj, ŝajne, ne tiom gravis kion travivis Jesuo, kiom liaj *diroj* kaj *instruoj*.

Nu, da tiaj kolektoj tre facile oni povis konstrui laŭ sia bezono. Kaj kiel oni povas supozi, diversaj pli malpli herezaj grupoj kristanaj ekhavis siajn proprajn kolektojn.

³ Pri liaj proceso kaj morto ankaŭ tiu ĉi Evangelio laŭ Tomaso tute silentas, eĉ ne enestas *Diroj de Jesuo* kiuj ĝin antaŭdiras.

La kolekto, kiun ĉi tie ni prezentas, estas la plej granda ĝis nun konata grupo da koheraj Diroj de Jesuo.

La enhavo de la Evangelio

Ĉu vere la Evangelio Kopta laŭ Tomaso devenas de *hereza* grupo, ne certas.

Unualoke jam ne klare difineblas, kio estas herezo; ĉar laŭ iuj religie estas ne nur akceptebla sed eĉ tute bona iu opinio, kiun aliaj konsideros malprava. Sed krom tio ne certas, de *kiuj* kristanoj ĝi estis verkita; kaj bone eblas, ke iam pruviĝos, kiel supozas i. a. prof-o Gilles Quispel, ke ĝi originas el judkristana medio. Nu, tiu medio ja ne pruviĝis la granda ĉefvojo de l' eklezio, sed tamen, nomi ĝin hereza, estus laŭ mi multe tro kuraĝe.

Pluraj Diroj ĝis alta grado kaj foje eĉ laŭvorte kongruas kun Diroj de Jesuo en la kanonaj evangelioj. (ekz. 9, 10, 20, 26, 31, 32, 34, 35 ktp). Aliaj certagrade variigas tiujn (ekz. 2, 8, 12, 16, 22 ktp). Sed ankoraŭ aliaj tute ne rilatas al kanonaj Diroj de Jesuo (ekz. 7, 13, 18, 21, 30 ktp).

Sed tamen la tuto neniel impresas tiom apokrifeca kiel pluraj pseŭdepigrafiaj evangelioj aŭ agoj.

Kvankam, oni trovis certajn rilatojn kun ekz. la Evangelio de la Hebreoj kaj la Evangelio de la Egiptoj.

En kelkaj Diroj sentiĝas certa malŝato pri geedzeco, aŭ laŭdiĝas soluloj (49, 75, 87). Certe fremde impresas la aserto de Jesuo (114) ke li faros Marian vira, por ke ankaŭ ŝi do fariĝu simila al viroj: «ĉar ĉiu virino, kiu sin faras vira, eniros en la regnon de l' ĉieloj». Tio igas nin kredi pri ia antaŭjuĝo de la verkinto kontraŭ virinoj. Kaj certe niaepoke, kiam eĉ feminisma teologio estiĝas, tio povas misimpresi. Sed aliloke ni legas (22): «kiam vi faros la viran kaj la inan je unusola, tiel ke vira ne estu plu vira kaj ina ne plu ina», kaj tiam, kun June Singer en ŝia verko

Androgyny, ni povas supozi, ke eble la aŭtoro celas iagradan kunfandiĝon de ecoj viraj kaj inaj ... Sed kiomgrade tio ĉi estas niaepoka klarigo aŭ tiutempa intenco, – nu, kiu decidus?

Ĉar inter la verkoj de Nag Hamadi multaj estas gnostikaj, oni ankaŭ en tiu ĉi evangelio serĉis tiun influon. Nu, certe troveblas eldiroj sub tiu influo. Numero unu substrekas, ke temas tie ĉi pri *kaŝita scio*: «kiu trovos la sencon de ĉi vortoj, ne gustumos la morton». Ankaŭ poste ripete renkontiĝas aludoj al sekreta kono (13, 17, – sed vidu 33!) aŭ misteroj (62). Sed tamen ni *ne* povas aserti, ke la tuto estas tipe gnostika!

Ne estas maleble, ke ĉi kolekto transdonis al ni kelkajn aŭtentajn Dirojn de Jesuo, kiuj alie ne estas konataj. Tiel prof-o J. Zandee supozas, kaj eble prave, ke Diro 58 estas originala. Certe trafas ofte la enhava saĝo de l' Diroj, kvankam kompreneble tio ne devas esti pruvo nek por nek kontraŭ aŭtenteco.

Pluraj el la Diroj ne jam funde rivelas al ni sian sencon, ĉar bedaŭrinde foje ne eblas traduki ilin bone (vidu ekz. 61: kiel el la Unu vi suriris mian liton ...) aŭ ili simple restas sence obskuraj (30). Sed ja povas esti, ke inter la ceteraj ankoraŭ ne publikigitaj verkoj de Nag Hamadi troviĝas verkaĵoj, kiuj tiun ĉi pliklarigos ...

La Evangelio Kopta laŭ Tomaso

1 Tiuj ĉi estas la kaŝitaj Diroj, kiujn Jesuo la vivanta diris, kaj kiujn skribis Didimo Judaso Tomaso.

Kaj li diris: Kiu trovos la sencon de ĉi tiuj vortoj, ne gustumos la morton.

2 Jesuo diris: Kiu serĉas, ne ĉesu serĉi, ĝis li trovis; kaj kiam li trovis, li konfuziĝos kaj kiam li konfuziĝos, li ekmiros kaj li fariĝos reĝo super ĉio.

3 Jesuo diris: Se tiuj, kiuj vin gvidas, diros al vi: Jen la regno⁴ estas en la ĉielo, tiam la birdoj de l' ĉielo vin antaŭiros. Se ili al vi diros: Ĝi estas en la maro, tiam la fiŝoj vin antaŭiros. Sed la regno estas interne de vi kaj ekstere de vi. Kiam vi ekkonos vin mem, tiam vi estos konata, kaj vi scios, ke vi estas infanoj de la Patro, kiu vivas. Sed se vi ne ekkonos vin mem, tiam vi estos en malriĉo, kaj vi mem estos malriĉo.

⁴ Regno de l' ĉielo aŭ regno de l' Patro aŭ regno senplie: la centra temo de la predikado de Jesuo.

4 Jesuo diris: Ne hezitos maljunulo demandi al septaga infaneto pri la loko de l' vivo, kaj li vivos; ĉar multaj unuaj fariĝos lastaj kaj ili fariĝos unusola.

5 Jesuo diris: Ekkonu tion, kio estas antaŭ via vizaĝo – kaj kio estas kaŝita al vi, riveliĝos al vi. Ĉar ne ekzistas io kaŝita, kio ne estos malkaŝita.

6 Demandis lin liaj lernantoj⁵ kaj diris: Ĉu vi volas, ke ni fastu? Kiel ni preĝu kaj ĉu ni donu almozojn? Kaj pri kiuj manĝoj ni atentu?

Jesuo diris: Ne mensogu, kaj kion vi malamas, tion vi ne faru, ĉar antaŭ la ĉielo ĉio estas malkaŝita; ĉar ne ekzistas io kaŝita, kio ne estos malkaŝita, kaj ne ekzistas io kovrita, kio restos ne-malkovrita.

7 Jesuo diris: Feliĉa la leono, kiun homo mangos, kaj la leono fariĝos homo; abomeninda estas la homo, kiun leono mangos, kaj leoniĝos la homo.

8 Kaj li diris: La homo similas fiŝiston inteligentan, kiu metis sian reton en la maron kaj tiris ĝin el la maro plenan je fiŝetoj. Inter ili trovis grandan bonan fiŝon la fiŝisto inteligenta. Li formetis ĉiujn fiŝetojn reen en la maron, kaj senmalfacile li elektis la grandan fiŝon. Kiu havas orelojn por aŭskulti, aŭskultu.

⁵ Disĉiploj.

9 Jesuo diris: Jen eliris semanto, plenigis sian manon kaj ĵetis; kaj kelkaj <semoj> falis sur la vojon; venis la birdoj kaj kolektis ilin; aliaj falis sur la rokon kaj ne ekhavis radikojn sube en la grundon kaj ne produktis spikojn al la ĉielo; kaj ree aliaj falis sur dornojn kaj tiuj sufokis la semon kaj vermoj manĝis ilin; kaj aliaj falis sur grundon bonan kaj donis frukton al la ĉielo; ĝis sesdekoble kaj centoble ili fruktis.

10 Jesuo diris: Mi metis fajron sur la mondon, kaj jen mi ĝin prizorgas ĝis ĝi ardos.

11 Jesuo diris: Tiu ĉi ĉielo forpasos kaj tiu super ĝi ankaŭ forpasos. Kiuj mortis, ne estas vivaj, kaj kiuj vivas, ne mortos. Je l' tago, kiam vi manĝis ion, kio estis senviva, vi ĝin faris viva. Kiam vi estos en la lumo, kion vi faros? Je l' tago, kiam vi estis unu, vi fariĝis du; sed kiam vi estos du, kion vi faros?

12 La lernantoj diris al Jesuo: Ni scias, ke vi foriros de ni; kiu estas li, kiu estos granda super ni⁶?

Jesuo diris: Kie ajn vi estos, vi iru al Jakobo la Justa, pro kiu estiĝis la ĉielo kaj la tero.

13 Jesuo diris al siaj disĉiploj: Faru komparon pri mi, kaj diru al mi, kiun mi similas. Simono Petro diris al li: Vi similas anĝelon justan. Mateo

⁶ T. e. kiu estos nia gvidanto?

diris al li: Vi similas homon filozofan inteligentan. Tomaso diris al li: Majstro, mia buŝo absolute ne tolerus, ke mi diru, kiun vi similas. Jesuo diris: Mi ne estas via majstro. Ĉar vi trinkis, vi ebriiĝis el la fonto ŝprucanta, kiun mi elmezuris. Kaj li prenis lin flanken, kaj diris al li tri vortojn. Sed kiam Tomaso revenis al siaj amikoj, ili lin demandis: Kion Jesuo diris al vi? Tomaso diris al ili: Se mi diros unu el la vortoj, kiujn li diris al mi, vi prenos ŝtonojn kaj ĵetos ilin sur min, kaj fajro eliros el la ŝtonoj kaj forbruligos vin.

14 Jesuo diris al ili: Se vi fastos, vi naskos pekon; kaj se vi preĝos, vi kondamniĝos; kaj se vi donos almozojn, vi faros malbonon por viaj spiritoj. Kaj se vi eniros en iun landon kaj se vi vojaĝos en la regionoj, kaj se oni vin akceptos, – manĝu kion oni metos antaŭ vin; kaj sanigu tiujn, kiuj estas malfirmaj inter ili; ĉar ne tio, kio eniros vian buŝon, vin malpurigos, sed kio eliros el via buŝo, tio vin malpurigos.

15 Jesuo diris: Kiam vi vidos lin, kiu ne naskiĝis el virino, ekfalu sur vian vizaĝon kaj adoru lin, ĉar li estas via Patro.

16 Jesuo diris: Eble la homoj kredas, ke mi venis meti pacon sur la teron. Ili ne scias, ke mi venis meti disigojn sur la teron: fajron, glavon, militon. Ĉar en domo estos kvin – kaj ili fariĝos tri kontraŭ du, kaj du kontraŭ tri, patro kontraŭ filo, kaj filo kontraŭ patro, kaj ili staros kiel soluloj.

17 Jesuo diris: Mi donos al vi tion, kion okulo ne vidis kaj kion orelo ne aŭdis kaj kion mano ne palpis kaj kio ne supreniĝis en koron de homo.

18 La lernantoj diris al Jesuo: Diru al ni: Kia estos nia fino?

Jesuo diris: Vi ja jam malkovris la komencon, ĉu, ke vi demandas pri la fino? Ĉar kie estas la komenco, tie estos la fino. Feliĉa tiu, kiu staros je l' komenco kaj kiu konos la finon kaj ne gustumos la morton.

19 Jesuo diris: Feliĉa estas, kiu estis antaŭ ol li estiĝis. Se vi fariĝos miaj lernantoj kaj aŭskultos miajn vortojn, ĉi tiuj ŝtonoj vin servos. Ĉar vi havas kvin arbojn en la paradizo, kiuj ne moviĝas somere <aŭ> vintre, kaj kies folioj ne ekfalos. Kiu ekkonos tiujn, tiu ne gustumos la morton.

20 La lernantoj de Jesuo diris: Diru al ni, kion similas la regno de la ĉieloj?

Li diris al ili: Ĝi similas grajnon sinapan; ĝi estas pli eta ol ĉiuj semoj; sed kiam ĝi falas en grundon, kiun oni prilaboris, ĝi kreskigas grandan planton kaj fariĝas ŝirmejo por la birdoj de la ĉielo.

21 Maria⁷ diris al Jesuo: Kiun similas viaj lernantoj?

Li diris: Ili similas infanojn kiuj troviĝas sur kampo, kiu ne apartenas al ili. Kiam venos la mastroj de l' kampo, ili diros: Redonu al ni nian kampon! Ili sin senvestigos antaŭ ili por lasi ĝin al ili kaj por redoni al ili ilian kampon. Pro tio mi diras ke, se la mastro de l' domo scios, ke venos ŝtelisto, li gardos kontraŭ ties veno kaj ne permesos al li trabori la domon de lia regno por forporti el ĝi la posedaĵojn. Vi do estu gardemaj kontraŭ

⁷ Maria Magdalena.

la mondo; zonu vin super la lumboj en granda forto, por ke la rabistoj ne trovu vojon atingi vin, ĉar ili trovos la utilaĵon kiun vi sopiras.⁸ En via mezo estu iu homo komprenema: kiam la fruktoj estas maturaj, li venas rapide kun la falĉilo en sia mano, kaj ĝin rikoltos. Kiu havas orelojn por aŭskulti, aŭskultu.

22 Jesuo vidis etulojn trinki lakton. Li diris al siaj lernantoj: Tiuj ĉi etuloj, kiuj trinkas lakton, similas tiujn, kiuj eniras en la regnon.

Ili diris al li: Do, ĉu ni eniros en la regnon kvazaŭ etuloj?

Jesuo diris al ili: Kiam vi faros el du unu, kaj kiam vi la internon faros kiel la ekstero kaj la eksteron kiel la interno, kaj la supron kiel la malsupro, kaj kiam vi faros la viran kaj la inan je unusola, tiel ke vira ne estu plu vira kaj ina ne plu ina, kaj kiam vi faros okulojn anstataŭ okulo kaj manon anstataŭ mano kaj piedon anstataŭ piedo, bildon anstataŭ bildo, – tiam vi eniros <en la regnon>.

23 Jesuo diris: Mi elektos vin, unu elinter mil kaj du elinter dekmil, kaj ili staros kiel soluloj.

24 Liaj disĉiploj diris al li: Klarigu al ni pri la loko, kie vi estas, ĉar estas necese por ni serĉi ĝin.

⁸ Frazo ne klara. Kelkaj tradukas: Ĉar la malfacilo kiun vi atendas, (nepre) materiigos. Alia traduko diras: por trovi la trezoron super kiu vi gardas.

Li diris al ili: Kiu havas orelojn, aŭskultu. Lumo estas interne de lumhomo kaj ĝi⁹ prilumas la tutan mondon; se ĝi ne prilumas, estas mallumo.

25 Jesuo diris: Amu vian fraton kiel vian vivon. Gardu lin kiel la pupilon de via okulo.

26 Jesuo diris: La ligneron, kiu estas en la okulo de via frato, vi vidas; sed la trabon, kiu estas en via okulo, vi ne vidas! Kiam vi elĵetos la trabon el via okulo, tiam vi klarvidos por eligi la ligneron el la okulo de via frato.

27 <Jesuo diris:> Se vi ne fastos je l' mondo, vi ne trovos la regnon. Se vi ne faros la sabaton sabato, vi ne vidos la Patron.

28 Jesuo diris: Mi ekstaris meze de la mondo kaj manifestiĝis al ili en karno. Mi trovis ilin ĉiujn ebriaj; mi ne trovis inter ili unu soifanta. Mia animo suferis pri la filoj de la homoj, ĉar ili estas blindaj en sia koro kaj ne klarvidas. Ĉar ili venis en la mondon malplenaj, kaj ili serĉas ankaŭ eliri el la mondo malplenaj. Sed nun ili estas ebriiĝintaj. Kiam ili forskuos de si sian vinon, tiam ili konvertiĝos.

⁹ Aŭ: li (dufoje).

29 Jesuo diris: Se karno estiĝis pro spirito, estas mirige; sed se spirito pro korpo, estas mire mirige. Efektive mi primiras la jenon: kiel tia riĉo ekloĝis en ĉi malriĉo!

30 Jesuo diris: Kie estas tri Dioj, ili estas Dioj. Kie estas du aŭ unu, mi estas kun tiu.

31 Jesuo diris: Profeto ne estas akceptata en sia vilaĝo; kuracisto ne sanigas tiujn, kiuj lin konas.

32 Jesuo diris: Urbo, konstruita sur monto alta kaj fortikigita, – ne eblas, ke ĝi falos aŭ ke ĝi restos kaŝita.

33 Jesuo diris: Kion vi aŭdos en via orelo, prediku ĝin <en alia orelo?> de sur viaj tegmentoj. Ĉar neniu ekbruligas lampon por meti ĝin sub mezurilon aŭ en kaŝejon; sed li metas ĝin sur kandelingon por ke ĉiuj enirantoj kaj elirantoj vidu ĝian lumon.

34 Jesuo diris: Se blindulo kondukas blindulon, ambaŭ falos en fosaĵon.

35 Jesuo diris: Ne eblas, ke iu eniros en la domon de fortulo kaj perfortos lin, krom se li ligas liajn manojn; tiam li renversos lian domon.

36 Jesuo diris: Ne estu de mateno ĝis vespero kaj de vespero ĝis mateno zorgoplenaj, per kio vesti vin.

37 Liaj lernantoj diris: Je kiu tago vi manifestiĝos al ni kaj je kiu tago ni vidos vin?

Jesuo diris: Kiam vi nudiĝos de via pudoro¹⁰ kaj kiam vi prenos viajn vestaĵojn kaj metos tiujn sub viajn piedojn, samkiel <faras> etaj knaboj, kaj surpaŝos ilin, tiam <vi vidos> la filon de Tiu, kiu vivas, kaj vi ne timos.

38 Jesuo diris: Multfoje vi deziris aŭdi tiujn ĉi vortojn, kiujn mi diras al vi, kaj vi ne havas iun alian por aŭdi ilin de li. Estos tagoj, kiam vi min serĉos kaj ne trovos.

39 Jesuo diris: Fariseoj kaj skribistoj ekprenis la ŝlosilojn de l' scio kaj kaŝis ilin. Ili mem ne eniris, nek permesis la eniron al tiuj, kiuj deziris. Sed vi estu prudentaj kiel serpentoj kaj simplaj kiel kolomboj.

40 Jesuo diris: Estis plantita iu vito sen la Patro, kaj ĉar ĝi ne fortiĝis, ĝi estos elradikigita kaj pereos.

41 Jesuo diris: Al tiu, kiu havas en sia mano, estos donite, kaj de tiu, kiu ne havas, ankaŭ la iometo, kiun li havas, estos forprenita.

¹⁰ Aŭ: Kiam vi senvestiĝos senpudore.

42 Jesuo diris: Fariĝu pasemaj.

43 Liaj lernantoj diris al li: Kiu vi estas, ke vi tion ĉi diras al ni?

<Jesuo diris:> Kion mi diras al vi, – ĉu pro tio vi ne scias, kiu mi estas? Vi ja fariĝis kiel la Judoj, ĉar ili <aŭ> amas arbon kaj malamas ĝian frukton, <aŭ> ili amas la frukton kaj malamas la arbon.

44 Jesuo diris: Al tiu, kiu blasfemas la Patron, estos pardonite, kaj al tiu, kiu blasfemas la filon, estos pardonite. Sed al tiu, kiu blasfemas la sanktan spiriton, ne estos pardonite, nek sur la tero nek en la ĉielo.

45 Jesuo diris: Oni ne kolektas vinberojn el inter dornoj, nek plukas figojn de sur kameldornoj; ĉar ili ja ne donas fruktojn. Bona homo aperigas bonaĵojn el sia trezoro; malbona homo aperigas malbonaĵojn el sia malbona trezoro, kiu estas en lia koro, kaj diras malbonaĵojn. Ĉar ja el la abundo de sia koro li aperigas malbonaĵon.

46 Jesuo diris: Ekde Adamo ĝis Johano Baptisto inter la naskitoj el virinoj ne estas unu, kiu estas pli alta ol Johano Baptisto, tiel ke liaj okuloj ne <kliniĝu antaŭ li>. Sed mi diris al vi: Kiu elinter vi estos malgranda, tiu konos la regnon kaj plialtiĝos super Johano.

47 Jesuo diris: Ne eblas, ke unu homo suriĝos du ĉevalojn aŭ streĉos du arkojn <samtempe>. Ne eblas, ke sklavo servos al du mastroj samtempe;

alie li honoros unu kaj mistraktos la alian. Neniu trinkas oldan vinon kaj tuj deziras trinki junan vinon. Oni ankaŭ ne metas junan vinon en malnovajn sakojn, por ke ili ne rompiĝu; kaj oldan vinon oni ne metas en novan sakon, por ke ĝi ne damaĝu ĝin. Kaj oni ne stebas ĉifonon malnovan sur novan vestaĵon, ĉar tio fariĝos ŝiriĝo.

48 Jesuo diris: Se du faros pacon unu kun l' alia en unusola domo, ili diros al monto: Foriru, kaj ĝi foriros.

49 Jesuo diris: Feliĉaj estas la soluloj kaj la elektitoj, ĉar vi trovos la regnon. Ĉar vi devenas el ĝi kaj tien ree vi iros.

50 Jesuo diris: Se oni diros al vi: De kie vi estas?, diru al ili: Ni venis el la lumo, de la loko, kie estiĝis la lumo el si mem, kie ĝi staris kaj manifestiĝis en bildo pri ili¹¹. Se oni diros al vi: Ĉu estas vi?, diru: Ni estas liaj filoj, kaj ni estas elektitoj de l' Patro, kiu vivas. Se oni vin demandas: Kio estas la signo de via Patro en vi?, diru al ili: Estas la movo kaj la ripozo.

51 Liaj lernantoj diris al li: Je kiu tago estos la ripozo de la mortintoj, kaj je kiu tago venos la nova mondo?

Li diris al ili: Kion vi atendas, jam venis, sed vi ne rekonis ĝin.

¹¹ Traduko ne certa.

52 Liaj lernantoj diris al li: Dudek kvar profetoj parolis en Izrael kaj ili ĉiuj parolis en vi.

Li diris al ili: Vi forgesis tiun, kiu vivas, kaj vi parolas pri tiuj, kiuj mortis?!

53 Liaj lernantoj diris al li: Cirkumcido, ĉu utilas aŭ ne?

Li diris al ili: Se ĝi utilus, ilia Patro naskigus ilin el la patrino cirkumciditaj. Sed vera cirkumcido en spirito fariĝis plene utila.

54 Jesuo diris: Feliĉaj estas la malriĉuloj, ĉar via estas la regno de l' ĉieloj.

55 Jesuo diris: Kiu ne malamas sian patron kaj sian patrinon, ne povos fariĝi mia lernanto, kaj kiu ne malamas siajn fratojn kaj siajn fratinojn kaj ne portos sian krucon kiel mi, ne estos inda je mi.

56 Jesuo diris: Kiu ekkonis la mondon, <nur> trovis kadavron, kaj je tiu, kiu trovis kadavron, la mondo ne estas inda.

57 Jesuo diris: La regno de l' Patro similas homon, kiu havas <bonan> semon. Lia malamiko nokte venis kaj semis lolon inter la bona semo. La homo ne permesis, ke oni pluku la lolon; li diris al ili: Ne eliru por pluki la lolon, por ke vi ne kun-pluku la tritikon kun ĝi. Ĉar en la tago de la rikolto la lolo manifestiĝos, estos plukita kaj forbruligita.

58 Jesuo diris: Feliĉa la homo, kiu suferis: tiu trovis la vivon.

59 Jesuo diris: Rigardu al Li, kiu vivas, dum vi vivas, por ke vi ne mortu, kaj por ke vi ne serĉu vidi Lin, nepovante vidi.

60 <Ili vidis> Samarianon, kiu portis ŝafidon kaj eniris Judujon.

Li diris al siaj disĉiploj: <Kion li faros> pri sia ŝafido?

Ili diris: <Li venas> por mortigi kaj manĝi ĝin.

Li diris: Dum ĝi vivos, li ne manĝos ĝin, sed nur kiam li ĝin estos mortiginta kaj kiam ĝi estos kadavro.

Ili diris: Alimaniere li ja ne povos fari tion.

Li diris al ili: Ankaŭ vi serĉu lokon por vi mem, por ripozo, por ke vi ne fariĝu kadavroj kaj oni vin ne manĝu.

61 Jesuo diris: Ripozos du sur lito; unu mortos, unu vivos.

Saloma diris: Kiu estas vi, homo, ke kvazaŭ el la Unu vi suriris mian liton kaj manĝis de mia tablo?

Jesuo diris al ŝi: Mi estas tiu, kiu estas el Li, kiu estas sendivida; estis donite al mi el la aĵoj de mia Patro.

<Ŝi diris:> Mi estas via lernanto.

<Jesuo diris al ŝi:> Do tial mi diras al vi, ke, kiam iu estos <nedividita>, li pleniĝos je lumo; sed se li estos diserigita, li pleniĝos je mallumo.

62 Jesuo diris: Mi diras miajn misterojn al tiuj, kiuj estas indaj je miaj misteroj. Kion faras via dekstra mano, via maldekstra ne sciu.

63 Jesuo diris: Estis riĉulo, kiu, havis multan monon. Li diris: Mi uzos mian monon por semi, rikolti, planti kaj plenigi miajn trezorejojn per fruktoj, por ke manku al mi nenio. Tio estas, kion li planis en sia koro. Kaj en tiu nokto li mortis. Kiu havas orelojn, aŭskultu.

64 Jesuo diris: Iu viro invitis gastojn. Kiam li la manĝon pretigis, li sendis sian sklavon por venigi la gastojn. Li iris al la unua kaj diris al li: Mia mastro vin invitas. Li diris: Al mi ŝuldiĝas mono de komercistoj, ili venos ĉi-vespere al mi, mi iros kaj ordonos al ili; mi pardonpetas pro la manĝo. Li iris al alia kaj diris al li: Mia mastro vin invitis. Li diris: Mi ĵus aĉetis domon kaj oni bezonas min unu tagon, mi ne havas eblon <veni>. Li iris al alia kaj diris al li: Mia mastro vin invitas. Li diris al li: Mia amiko edziĝos kaj mi prizorgos la manĝon, mi ne povas veni. Mi pardonpetas pro la manĝo. Li iris al alia kaj diris al li: Mia mastro vin invitas. Li diris al li: Mi aĉetis vilaĝeton, mi ĵus foriras por kolekti la tributon. Mi ne povos veni, mi ekskuzas min. La sklavo foriris kaj diris al sia mastro: Tiuj kiujn vi invitis por la manĝo, sin ekskuzas. La mastro diris al sia sklavo: Iru eksteren al la stratoj, kunigu tiujn, kiujn vi trovos, por manĝi. Komercistoj kaj vendantoj ne eniros en la lokojn de mia Patro.

65 Li diris: Viro bonkora havis vitejon. Li donis ĝin al kampuloj por ke tiuj prilaboru ĝin kaj li ricevu de ili ĝian frukton. Li sendis sian sklavon, por ke la kampuloj donu al li la frukton de l' vitejo. Ili ekprenis lian

sklavon kaj bategis lin; malmulte mankis, ke ili lin mortigus. La sklavo foriris kaj diris ĝin al sia mastro. La mastro diris: Eble ne konis <ilin>¹². Li sendis alian sklavon. La kampuloj bategis ankaŭ la alian. Tiam la mastro sendis sian filon kaj diris: Eble ili respektos mian filon. Sed la kampuloj, ĉar ili sciis ke li estas la heredonto de l' vitejo, ekprenis lin kaj mortigis lin. Kiu havas orelojn, aŭskultu.

66 Jesuo diris: Montru al mi la ŝtonon, kiun rifuzis la konstruantoj. Ĝi estas angulŝtono.

67 Jesuo diris: Kiu konas la tuton, krom sin mem, tiu maltrafis ĉion.

68 Jesuo diris: Vi estas feliĉaj, kiam oni vin malamas kaj persekutas. Kie oni vin persekutis, ili ne trovos lokon.

69 Jesuo diris: Feliĉaj estas tiuj, kiujn oni en ilia koro persekutis. Ili estas tiuj, kiuj vere ekkonis la Patron. Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas, ĉar pleniĝos la ventro de tiu, kiu deziras.

70 Jesuo diris: Savos vin tio, kion vi havas, kiam vi naskos ĝin en vi mem. Mortigos vin tio, kion vi ne havas en vi, se vi ĝin ne havos en vi.

71 Jesuo diris: Mi renversos ĉi domon, kaj neniun povos ree ĝin konstrui.

¹² Aŭ: ili ne konis lin.

72 <Viro diris> al li: Diru al miaj fratoj, ke la aĵojn de mia patro ili dividu kun mi.

Li diris al li: Ho viro, kiu faris min dividanto?

Li turnis sin al siaj lernantoj kaj diris al ili: Ĉu mi estas dividanto?

73 Jesuo diris: La rikolto estas abunda, sed da laboristoj estas malmulte. Tial vi petu de l' Sinjoro, ke li sendu laboristojn por la rikolto.

74 Li diris: Ho Sinjoro, estas multaj ĉirkaŭ la fonto, sed neniuj estas en la fonto.

75 Jesuo diris: Multaj staras ĉe la pordo, sed estas la soluloj, kiuj eniros al la edziĝa ĉambro.

76 Jesuo diris: La regno de l' Patro similas komerciston, kiu havis ŝarĝon kaj ektrovis perlon. La komercisto estis saĝa. Li vendis sian ŝarĝon kaj aĉetis nur por si la perlon. Ankaŭ vi serĉu trezoron el tio, kio ne putras, daŭran, al kiu alproksimiĝas nek tineo por manĝi nek vermo por neniigi ĝin.

77 Jesuo diris: Mi estas la lumo, kiu estas super ili ĉiuj. Mi estas la tuto. La tuto estiĝis el mi, kaj la tuto revenos en min. Rompu lignon, kaj tie mi estas. Levu ŝtonon, kaj tie vi min trovos.

78 Jesuo diris: Kial vi eliris en la dezerton? Ĉu por vidi kanon movatan de l' vento? Ĉu por vidi viron sur kiu estis vestaĵoj molaj? <Jen, viaj> reĝoj kaj viaj altranguloj, – sur tiuj estas molaj vestaĵoj, kaj ili ne povos distingi la veron.

79 Virino el la amaso diris al li: Feliĉa la ventro kiu vin portis kaj feliĉaj la mamoj kiuj vin nutris!

Li diris al ŝi: Feliĉaj tiuj, kiuj aŭdis la vorton de l' Patro kaj gardis ĝin vere. Ĉar venos tagoj, ke vi diros: Feliĉa la ventro, kiu ne koncipis, kaj feliĉaj la mamoj kiuj ne donis lakton.

80 Jesuo diris: Kiu ekkonis la mondon, trovis la korpon. Sed je li, kiu trovis la korpon, la mondo ne estas inda¹³.

81 Jesuo diris: Kiu fariĝis riĉa, estu reĝo; kaj tiu, kiu havas povon, abdiku.

82 Jesuo diris: Kiu estas proksima al mi, estas proksima al la fajro, kaj tiu, kiu estas malproksima de mi, estas malproksima de la regno.

¹³ Vidu numeron 56.

83 Jesuo diris: La bildoj manifestiĝas al la homo, sed la lumo, kiu estas en ili, restas kaŝita en la bildo de l' lumo de la Patro. Revelaciigis Li, sed lia bildo restos kaŝita pro lia lumo.

84 Jesuo diris: Je l' tago, kiam vi vidos vian similaĵon, vi ĝojos. Sed kiam vi vidos viajn bildojn, kiuj estiĝis antaŭ vi, kaj kiuj nek mortas nek manifestiĝas, – kiom vi eltenos?

85 Jesuo diris: Adamo fariĝis el granda povo kaj granda riĉo, kaj li ne fariĝis inda je ĝi. Ĉar se li estus inda, li ne <gustumus> la morton.

86 Jesuo diris: <La vulpoj havas siajn kavojn kaj> la birdoj sian neston, sed la homido ne havas lokon por kuŝigi sian kapon kaj ripozi.

87 Jesuo diris: Mizera estas la korpo, kiu dependas de korpo. Kaj mizera estas la animo, kiu dependas de ambaŭ.

88 Jesuo diris: La anĝeloj venos al vi kun la profetoj, kaj ili donos al vi, kio <jam> apartenas al vi. Kaj ankaŭ vi donu al ili tion, kio estas en viaj manoj. Kaj diru al vi mem: Je kiu tago ili venos por preni, kio apartenas al ili?

89 Jesuo diris: Kial vi lavas la eksteriĝon de l' pokalo? Ĉu vi ne komprenas, ke tiu, kiu faris la internon, estas la sama, kiu ankaŭ faris la eksteriĝon?

90 Jesuo diris: Venu al mi, ĉar mia jugo estas agrabla kaj mia regado estas milda; kaj vi trovos por vi ripozon.

91 Ili diris al li: Diru al ni, kiu vi estas, por ke ni kredu je vi.

Li diris al ili: Vi legas la vizaĝon de ĉielo kaj tero, kaj tiun¹⁴, kiu estas tuj antaŭ vi, vi ne scias legi ĝis ĉi tempo.

92 Jesuo diris: Serĉu, kaj vi trovos. Sed tion, je kio vi demandis min en pasintaj tagoj, kaj kion mi je tiuj tagoj ne diris, nun plaĉas al mi diri ĝin, sed vi ĝin ne serĉas.

93 <Jesuo diris:> Ne donu, kio estas sankta, al la hundoj, por ke ili ne ĵetu ĝin sur sterkejon. Ne ĵetu perlojn al la porkoj, por ke ili ne <dismordu ĝin>.

94 Jesuo <diris:> Kiu serĉas, trovos, kaj <al tiu, kiu frapas la pordon,> estos malfermite.

95 <Jesuo diris:> Se vi havas monon, ne donu ĝin por rentumo, sed donu ĝin al tiu, de kiu vi ne rricevos.

¹⁴ Aŭ: tion, kio ...

96 Jesuo <diris:> La regno de l' Patro similas certan virinon. Ŝi prenis iom da fermento kaj <kaŝis> ĝin en paston kaj faris el tio grandajn panojn. Kiu havas orelojn, aŭskultu.

97 Jesuo diris: La regno <de l' Patro> similas certan virinon, kiu portis kruĉon plenan je faruno. Kiam ŝi iris <je> la vojo, distance de l' hejmo, la tenilo de l' kruĉo rompiĝis. La faruno fluis post ŝi sur la vojon. Ŝi ne rimarkis, ŝi ne sciis pri la malfeliĉo. Kiam ŝi alvenis al sia hejmo, ŝi starigis la kruĉon kaj trovis ĝin malplena.

98 Jesuo diris: La regno de l' Patro similas certan viron, kiu intencis mortigi viron potencon. Li elingigis sian glavon en sia propra domo, kaj traboris la muron por ekscii, ĉu lia mano estas sufiĉe fortika. Kaj tiam li mortigis la potenculon.

99 La lernantoj diris al li: Viaj fratoj kaj via patrino staras ekstere.

Li diris al ili: Tiuj ĉi en ĉi tiu loko, kiuj faras la volon de mia Patro, – tiuj estas miaj fratoj kaj mia patrino. Ili estas tiuj, kiuj eniros en la regnon de mia Patro.

100 Ili montris al Jesuo oran moneron, kaj diris al li: La Cezaranoj postulas de ni tributon.

Li diris al ili: Donu al Cezaro, kio estas de Cezaro. Donu al Dio, kio estas de Dio. Kaj donu al mi, kio estas de mi.

101 <Jesuo diris:> Kiu ne malamas sian patron kaj sian patrinon kiel mi, ne povos fariĝi mia lernanto¹⁵; kaj kiu ne amas <sian patron kaj> sian patrinon kiel mi, ne povos fariĝi mia <lernanto>; ĉar mia patrino <donis al mi malbonon¹⁶>, sed <mia> vera <patrino> donis al mi la vivon.

102 Jesuo diris: Ve al ili, la fariseoj, ĉar ili similas hundon kuŝantan sur bovina manĝujo. Ĉar ĝi nek mem manĝas nek permesas la bovinojn manĝi¹⁷.

103 Jesuo diris: Feliĉa estas la viro, kiu scias, je kiu flanko eniros la rabistoj. Ĉar li ekstaros kaj kunigos sian <forton?> kaj zonos sin super la lumboj, antaŭ ol ili eniros.

104 Ili diris <al li>: Venu, hodiaŭ ni preĝu kaj fastu.

Jesuo diris: Kio do estas la peko, kiun mi faris, aŭ pri kio oni min venkis? Sed kiam la novedzo eliros el la edziĝa ĉambro, tiam ili fastu kaj preĝu.

105 Jesuo diris: Kiu konos patron kaj patrinon, tiu nomiĝos filo de meretrico.

¹⁵ Vidu numeron 55.

¹⁶ Teksto necerta.

¹⁷ Vidu numeron 39.

106 Jesuo diris: Kiam vi faros el du unu, vi fariĝos filoj de homo, kaj se vi diros: Monto, foriru, ĝi foriros.

107 Jesuo diris: La regno similas paŝtiston, kiu posedis cent ŝafojn. Unu el ili vojperdiĝis, nome la plej granda. Li lasis la naŭdek naŭ kaj serĉis ĝin solan, ĝis li trovis ĝin. Kiam li laciĝis, li diris al la ŝafo: Mi amas vin pli ol la naŭdek naŭ.

108 Jesuo diris: Tiu, kiu trinkos el mia buŝo, fariĝos simila al mi. Kaj mi mem fariĝos li, kaj la kaŝitaĵoj estos malkaŝitaj al li.

109 Jesuo diris: La regno similas viron, kiu havis en sia agro trezoron <kaŝitan>, al li nekonatan. Post kiam li mortis, li heredigis ĝin al sia filo. La filo ne sciis ĝin, heredis la agron kaj vendis ĝin. Kaj la aĉetinto venis plugi, trovis la trezoron kaj ekis prunti monon por rentumo <al kiuj> li deziris.

110 Jesuo diris: Kiu trovis la mondon kaj fariĝis riĉa, abdiku la mondon.

111 Jesuo diris: La ĉieloj kaj la tero estos rulvolvitaj antaŭ vi. Kaj kiu vivas el la Vivanta ne vidos la morton nek <timon>, ĉar Jesuo diras: Je tiu, kiu trovas sin mem, la mondo ne estas inda¹⁸.

¹⁸ Iom stranga versiklo; estas kvazaŭ Jesuo citas Jesuon.

112 Jesuo diris: Ve al la karno, kiu dependas de l' animo. Ve al la animo, kiu dependas de karno¹⁹.

113 Liaj lernantoj diris al li: La regno, – je kiu tago ĝi venos?

<Jesuo diris:> Ne venos ĝi al via atendo. Oni ne diros: Jen tie ĝi estas, aŭ: Jen tie ĉi. Sed la regno de l' Patro etendiĝas sur la tero, kaj la homoj ĝin ne vidas.

114 Simono Petro diris al li: Maria foriru de ni, ĉar virinoj ne estas indaj je la vivo²⁰.

Jesuo diris: Jen mi levos ŝin, por fari ŝin vira, por ke ankaŭ ŝi fariĝu viva spirito simila al la viroj. Ĉar ĉiu virino, kiu sin faros vira, eniros en la regnon de l' ĉieloj.

<Tio ĉi estas> la evangelio laŭ Tomaso.

¹⁹ Vidu numeron 87.

²⁰ Vidu ankaŭ en la *Evangelio laŭ Maria [Magdalena]*.